

Boletín

Bulteno de Hispana Esperanto-Federacio
Aperanta de 1949
Numero 388 (julio-septembro 2009)

Ĉefredaktanto:

Ángel Arquillos

Kunlaboris: Antonio Marco Botella, Ángel Arquillos, Jorge Camacho, Luis Serrano, Daniela, Augusto Casquero, Rafaela Urueña, Lupe Sanz, Félix Jiménez Lobo,

Korektado: Alejandro Pareja

bulteno@esperanto.es

Calle Ánfora, 6-5º-D

29013-Málaga

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la respektivaj aŭtoroj.

*La redaktanto rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn

*Estas permesite republikigi la enhavon menciante la fonton kaj sciigante la redakcion.

Hispana Esperanto Federacio
Federación Española de Esperanto
Rodríguez San Pedro, 13, 3º, 7;
ES-28015 Madrid

admin.@esperanto.es

Tel (34) 914468079

Konto ĉe BBVA:

0182-1252-31-0204011961

Estraro

Prezidanto: Pedro Hernández

Sekretario: Félix Jiménez Lobo

Kaŝisto: Raúl Martínez Anguita

Voĉdonantoj: Juan Trenado Serrano,

HEJS: Miguel Hernández

Presejo: Gráficas Aurora. Zaragoza
DL-Z-334-90

ENHAVO

Asamblea General Extraordinaria.....	2
Presupuesto para el año 2009.....	5
Pri grupoj kaj asocioj kaj tiel plu.....	6
Al mia kara amiko Vicenç Hernández..	8
Esperanto kiel energio ne kiel ornamo..	9
Subencipeto Fundación Esperanton...	10
Komuna Europa referenckadro.....	11
Letero al la redakcio.....	12
La legantoj poemas.....	13
Raporto pri la Hispana Kongreso.....	14
Edukado en Ĉinio.....	17
EEU Kongreso Herzberg.....	21
Doñana 40-jara.....	23
La naskiĝo de du popolaj versoformoj.5	25
Sekcio pri gravaj esperantistoj.....	28



ASAMBLEA GENERAL EXTRAORDINARIA MÁLAGA, 5 DE JULIO DE 2009

El día 5 de julio de 2009, a las 10:00 horas, en el Salón de Actos del Albergue Juvenil de Málaga, en la Plaza Pío XII, 6, previa convocatoria por el Presidente en “Boletín” nº 387, se celebra la Asamblea General Extraordinaria de la Federación Española de Esperanto. Asisten 20 socios y 1 está representado por uno de los presentes. Directivos asistentes: Pedro Hernández, Félix Manuel Jiménez, Raúl Martínez, Ángel Arquillos y Juan Trenado.

1.- Aprobación del Acta de la Asamblea Anterior.

Al no recibir ningún comentario al acta, publicada en el “Boletín” nº 387, se aprueba por unanimidad.

2.- Informe sobre los socios

En situación de alta a 30/06/09 (al corriente de pago o con dos años pendientes), por categorías:

OM (ordinarios)	171 (de ellos, 11 de la sección juvenil HEJS)
DM (vitalicios)	24
KM (colectivos)	15
PM (patronos)	9
HM (honorífico)	<u>1</u>
TOTAL SOCIOS	220
AB (abonados a “Boletín”)	3

Los abonados a “Boletín” se cuentan aparte, ya que no son socios.

Deben dos años (2007 y 2008)	15
Deben un año (2008)	25
Altas en 2008 y hasta 30/06/09	8
Repescados en 2008 y hasta 30/06/09	3
Bajas en 2008 y hasta 30/06/09	36 (3 por defunción, 5 voluntariamente y 28 por deber más de dos años)

El secretario Félix Manuel Jiménez compara estos datos con los del informe de la Asamblea del 5 de julio de 2008 y destaca el importante descenso del número de socios, provocado principalmente por las bajas debidas a cuotas impagadas. Asimismo destaca el bajo número de miembros de la sección juvenil.

3.- Informe sobre el Presupuesto para 2009

Las cuentas, la memoria económica, y la memoria de actividades de 2008, publicadas en el “Boletín” nº 386, fueron aprobadas en la Asamblea General Ordinaria de 26 de abril de 2009 y presentadas al Ministerio del Interior, que hasta la fecha no ha notificado su aprobación.

El presupuesto para 2009 es presentado por el Tesorero Raúl Martínez y aprobado por unanimidad, no obstante el Tesorero comenta que el mismo depende de conseguir al menos una de dos subvenciones solicitadas en el marco del 150 aniversario del nacimiento de Zamenhof, de las que una ya se sabe oficialmente que ha sido denegada.

Se aprueban las cuotas para 2010, que permanecen idénticas a las de 2009.

4.- Programa de actividades para 2009

Se presenta el programa de actividades para 2009, que gira entorno al 150 aniversario del nacimiento de Zamenhof. Se propone principalmente una exposición itinerante que se ha inaugurado en Málaga y conferencias y se destacan las jornadas realizadas en Madrid, en el distrito de Arganzuela, en colaboración con el Esperanto-Liceo de Madrid (MEL). Sobre la exposición, se ha pedido exponerla en varios centros culturales de los distritos de Madrid. Se irá informando de todo ello a lo largo del año.

El secretario informa asimismo que se está adecuando HEF para cumplir la Ley de Protección de Datos, para lo cual ya se han hecho dos de los pasos necesarios: registrar los ficheros en la Agencia Española de Protección de Datos, e informar y pedir el consentimiento de todos los socios para el uso de sus datos. Quedaría un tercer paso, que es implementar un sistema de seguridad, algo en lo que se está ya trabajando.

5.- Dimisión del Presidente de la Junta Directiva.

El Presidente Arturo Jiménez Carretero presentó oficialmente su dimisión en mayo de 2009. La Junta Directiva la aceptó, siendo el último acto de aquél convocar la presente Asamblea. Pedro Hernández, como Vicepresidente, asumió el cargo de Presidente provisionalmente y hasta la elección de uno nuevo en la Asamblea, todo ello acorde con los Estatutos de la Asociación.

6.- Ratificación del Presidente de la Junta Directiva

Se ha recibido una sola candidatura al cargo, precisamente del vicepresidente Pedro Hernández, que es aceptada y ratificada por unanimidad. Queda por tanto vacante el cargo de Vicepresidente, que no es imprescindible de acuerdo a los Estatutos.

7.- Ruegos, preguntas y propuestas

A) El secretario Félix M. Jiménez expone una propuesta del socio Pedro Antonio Garrote, a quien representa: *“Propongo que la oficina de HEF en Madrid la usen solamente los miembros de la directiva y sus colaboradores más próximos”*. El Vicepresidente, Pedro Hernández comenta que la oficina, además del uso de los directivos de HEF y los voluntarios, es compartida en uso por el MEL, por un acuerdo de hace unos años que no ha sido revocado y que marca las contraprestaciones de dicho uso, por otra parte, el uso del mismo local por otros grupos esperantistas es algo bueno y deseable, por lo que la propuesta no es aceptada, decidiendo la Asamblea desestimarla.

B) Luis Hernández pide aclaraciones sobre la posible organización de la UK2011 en Madrid, Raúl Martínez aclara que fue a raíz de un ofrecimiento del mismo Ayuntamiento de Madrid para organizarla, pero que la decisión final depende de UEA en el UK2009 de Bialystok. Rafaela Urueña pregunta sobre el lugar donde se desarrollaría el congreso y pide que, en caso de que se consiga la UK en Madrid, Valladolid acoja el “antecongreso”. Raúl Martínez responde indicando que el lugar sería el Palacio de Congresos de Madrid, ofrecido por el propio Ayuntamiento. J. Iturrioz pregunta si hay en Madrid suficientes fuerzas como para organizar el UK, ante lo cual Pedro Hernández responde que confía en conseguir un número mínimo de personas para colaborar y que como gran parte de la misma correría por cuenta del Ayuntamiento y de la propia UEA, no debería ser un problema.

C) Alejandro Pareja solicita conocer cómo es el nuevo modo de aprobación de los contenidos del “Boletín”. Pedro Hernández responde que una vez que los textos hayan sido corregidos, tarea realizada por el propio Alejandro, el redactor mandará los textos a los miembros de la Junta Directiva antes de su envío definitivo a la imprenta, ya que cómo “Boletín” es el órgano oficial de la asociación, la directiva debe conocer lo que se va a publicar con antelación.

D) J. Iturrioz anuncia su dimisión como “A-Komitatano” de HEF ante UEA, la Junta Directiva acepta su dimisión y se propone a Augusto Casquero como “A-Komitatano” ante UEA para el UK2009.

E) Se proponen para el Congreso Español 2010 las ciudades de Santiago de Compostela y Valencia. Finalmente se acepta Santiago de Compostela, dado que hace tiempo que no se celebran congresos en Galicia, mientras que en Levante se han celebrado varios en la última década.

No habiendo más asuntos que tratar, a las 11:00 horas el Vicepresidente dio por finalizada la Asamblea.

El Vicepresidente,
Pedro Hernández Úbeda

El Secretario,
Félix M. Jiménez

Presupuesto para el año 2009

INGRESOS

Prestaciones de servicios (<i>Venta de libros, Cursos...</i>)	800,00
Ingresos de Gestión Corriente (<i>Cuotas y Congresos</i>)	5.800,00
De Instrumentos Financieros en Terceros	350,00
TOTAL	6.950,00

GASTOS

Consumo de mercaderías (<i>Libros</i>)	950,00
Servicios Exteriores:	
<i>a2) Reparaciones y Conservación</i>	75,00
<i>a5) Primas de Seguros</i>	80,00
<i>a6) Servicios Bancarios y Similares</i>	250,00
<i>a7) Publicidad, Propaganda y Relaciones Públicas</i>	3.850,00
<i>a8) Suministros</i>	150,00
<i>a9) Otros Servicios</i>	1.595,00
TOTAL	6.950,00

PRI GRUPOJ KAJ ASOCIOJ KAJ TIEL PLU

Andaluzio

Andaluzia Kongreso en Jaeno

Dum la pasinta hispana kaj andaluzia kongresoj de Esperanto, okazintaj en Malago, de la 2-a ĝis la 5-a de julio 2009, AEU, akceptis la peton de Jordi Lietor, membro de la grupo de Jaeno, por okazigi en tiu urbo, la 15-an andaluzan kongreson de Esperanto en la monato oktobro 2010. Baldaŭ ni estos informataj pri la evento pere de nia andaluzia paĝaro kaj diversaj bultenoj. Ni vigligas la jaenan grupon, kaj certe el la tuta Andaluzio, ni kunlaboros, kvankam ĝis la monato oktobro, ebla dato de la Kongreso, ni havos tempon, tamen ni jam pripensas okazaĵojn kaj invitas al ĉiuj gesamideanoj kunlabori per ideoj por sukcesigi la eventon kaj profiti la okazon viziti la t.n. *Urbo de la Sankta Regno*, kie ni malkovros belajn monumentojn kaj bonan etoson.

Ángel Arquillos

Kantabrio

Pedro Ullate eksponas tajdosone

Pedro Ullate, pli konata en nia movado kiel libro-ilustranto kaj prezidanto de Kantabra Esperanto-Asocio estas ankaŭ majstra ceramikisto, kies verkojn eblas admiri ĝis fine de septembro en la registara eksponejo de Santillana del Mar, "Casas del Águila y la Parra".

La ekspozicion, sub la titolo "Son de mareas", inaŭguris Francisco Javier López Marcano, Konsilanto pri Kulturo de la Kantabra Registaro, la pasintan mardon, 25an de auxgusto.

Pere de siaj verkoj, kun sugeste ondaj formoj kaj superrego de bluaj koloroj, la artisto elvokas maristajn scenojn, ties popolanojn kaj peizaĵojn, ties mitojn kaj legendojn.

Ullate naskiĝis en Santoña kaj jam de



junaĝo li montris intereson al diversaj artaj esprim-rimedoĵ kel desegno kaj pentrarto.

Inter la libroj ilustritaj de li troviĝas la omaĝlibro rete eldonita *La Deko Logo* kaj jenaj esperantaj tradukoj: *La stultaj infanoj* de Ana María Matute, *Platero kaj mi* de Juan Ramón Jiménez, kaj *Makako kaj Antono de Alfredo Gómez Cerdá*. Ĉi lastan li ankaŭ tradukis.

Kastilio-La Manĉo

Pasintan julion okazis en la Lagunaro de Ruidera (en Kastilio – La Manĉo) la Dua Vinlanda Renkontiĝo. Ĝin organizis EMAs (Esperanta Manĉa Asocio) kune kun HEJS (junulara fako de HEF).

La renkontiĝo daŭris tutan semajnfino dum kiu la partoprenantoj, venintaj el pluraj provincoj, ĉeestis en kampadejo apud la lagunaro. La ĉeeston de anoj de HEF kaj HEJS kaj de anoj de EMAs

oni profitis por iomete laborkunsidi kaj diskuti pri novaj strategioj por la organizado ene de nia movado. Inter la projektoj diskutitaj elstaras la kreado de forumo E-KLM (Esperanto Kastilio – La Manĉo) alirebla per GoogleGroups.

Ankaŭ eblis ĝui kaj la ĉarman etoson de tiu natura parko -especiale ĉar la vetero estis bonega- kaj la festeman etoson kiun, ĉiunokte, aperigis tuj apud la kampadejo.

Jesús García Cano “Chus”

Katalunio

Tiu ĉi jaro 2009, Katalunio omaĝas Johano Amades okaze de 50a jaro de lia forpaso.

Dum sia juneco Amades lernis Esperanton kaj aktive partoprenis en la movado.

Li multe helpis la 5an Universalan Kongreson en la jaro 1909 en Barcelono kun ĉeesto de D-ro Zamenhof. La jaron 1922 li estis elektata prezidanto de Kataluna

Esperanto-Federacio.

Johano Amades, granda folkloristo, traveturis multajn katalunajn vilaĝojn kompilante diraĵojn, preskribojn, uzojn, kutimojn, rakontojn, kantojn kaj dancojn.

Li verkis dekojn da libroj, *Histories i Llegendes de Barcelona*, en du volumoj, *Costumari Catalá*, en kvin volumoj, entute 5,000 paĝojn; *Les cent millors cançons populars*, *Les diades populars catalanes*, *Refranyer catalá comentat*, *Folklore de Catalunya*, ktp.

Li ankaŭ verkis *Kataluna Popolkanto*, katalunaj kantoj tradukitaj en Esperanton.

La subtitolita filmo, prezentita en DVD, estas dividita en tri partoj. La unua parto de 30 minutoj enhavas biografion kaj folklorajn specimenojn. La

dua parto de 20 minutoj enhavas antikvan fabelon. En la tria parto de 4 minutoj, la Ĥoro Heura de L' Hospitalet de Llobregat *kantas* en Esperanto

Montaroj de Kanigo.

La aŭtoro kaj reĝisoro de la filmo estas Raúl Contel

Marti Guerrero i Cots

Kataluna Esperanto Fervojista Asocio

Madrido

Lupe Sanz-Bueno

Carmen Suárez kaj Lupe Sanz, estraranoj de MEL, vespermanĝis en Riga



(Latvio) kun esperantistoj: s-rino Margarita Zelve kaj s-roj Maris Jakobsons kaj Aldis Buss.

ESPERANTISTOJ EN ISLANDO



Dum la somero, la sekretario de HEF Félix M. Jiménez vojaĝis en Islandon kaj kontaktis en Rejkjaviko kun la landa asocio IEA (Islanda Esperanto Asocio). Nome de HEF li ricevis la donacon de la islanda traduko de la *Cigana romancaro* de Lorca, tradukita pere de la esperanta traduko. En la foto aperas la oficejo de IEA en la centro de la islanda ĉefurbo, kaj kun Jón Eliasson, Ĉefdelegito de UEA, kun kiu li promenadis tra la urbo



AL MIA KARA AMIKO KAJ SAMIDEANO VICENÇ HER- NANDEZ LLUSERA

Ne, mi jam scias, ke mi ne povas iri al via hejmo por konsulti pri diversaj Esperantaj gramatikaĵoj, aŭ por paroli kun vi pri la vivo kaj disvolviĝo de Esperanto. Ne, vi jam ne plu estas inter ni, sed kara amiko, ne pensu, ke komplete vi forlasis nin, almenaŭ por mi ne, absolute ne! Flugas en mia proksimeco io nevidebla, kio atentigas min. Ja estas io, stranga sed, afabla, estas kvazaŭ io persekutas min. Jes, amiko, samideano Llusera, permesu, ke mi uzu tiun patrinan familian nomon, ĉar estis sub tiu nomo, kiel ni ĉiuj rilatiĝis al vi. Jes, kara amiko, tiu fluganta fantomo tre plaĉas al mi. Kaj mi esperas kaj tiu estos mia celo, ke tiu plezuro, kiun mi sentas akompanu min konstante, ĉiam, sen tempolimoj. Jes, vi ne tute mortis, io restis inter ni, inter viaj geamikoj kaj gesamideanoj. Io, kion neniu povas forrabi el ni. Ĉar niaj rememoroj al via personeco, estas tute miaj, niaj. Kvankam kiel diris la majstro, mia koro batas pli rapide, mi ne volas plori, amiko Llusera, mi ne volas plori. Mi sentas interne de mi, kial mi diras interne? Mia kara amiko, jes mi sentas vin interne de mia menso, kaj ekstere ion kio ĉirkaŭas min, kaj kiel dirite ne videbla, sed ja sentata. Ĝi estas magio de feliĉo, feliĉo kiun donas al mi tiom da rememoraĵoj travivitaj kune, en tiu mondo nia plena de iluzioj, de defioj, utopioj, de nia lukto, paca, senarmila por ke la homaro estu pli feliĉa. Belaj momentoj, tagoj kaj, kiel ne, la tuta tempo kiun ni dediĉis al tiu laboro. Mi diras ĉiam; kiam amiko mortas, ankaŭ la vivantoj mortas iomete. Kaj tio estas granda vero. Mi ne sentas min kiel antaŭe, mankas al mi io, kaj tiu io, estas vi kara samideano. Jes, oni diras, ke la pasado de la tempo estas nura rimedo por ĉion forgesi, sed tiu diraĵo, en tio, kio rilatas al mi, ne estas vera. Ne povas esti, ke la morto disigas nin. Ne, ne povas esti kaj mi luktos por ke tio ne okazos.

Aparte de tiu konstanta laboro por Esperanto, mi ankaŭ ŝuldas al vi intervenon en mia vivo, tiun interrilatigon, kiu donis, kaj donas al mi multan, multegan feliĉon. Vi interrilatigis min al tiu, iam fraŭlino, kiu hodiaŭ estas mia edzino. Feliĉaj 46 jaroj (ĝis hodiaŭ), kies parton aŭ tu-ton mi, ni, ŝuldas al vi, la estigon de mia amata familio. Kaj kiam oni estas jam sufiĉe aĝa, kiel mi nun, estas kiam tiuj valoroj reakiras forton kaj respregulas multe pli amplekse la valorojn de amikeco kaj samideeco.

Ni restis kvazaŭ orfaj, ni ne plu povas vin konsulti pri esperantaĵoj, ĉio dependas de ni kaj de viaj lecionoj instruataj antaŭtempe. Via posedo de Esperanto mi ĉiam admiris, ĉar sen superaĵ studoj vi atingis la pinton de nia kara lingvo, eble tio montras la facilecon de la lingvo, sed ankaŭ evidentigas vian kapablon en tiu disciplino.

Kaj kara amiko, samideano, mi ne povas silenti pri via honesteco, ĉiam preta helpi al kiu ajn, via toleremo. Vi lasis al ni spurojn sekvendajn kaj tion ni faros. Almenaŭ mi promesas al vi, ke mi daŭre laboros por nia kara Esperanto kaj la mesaĝo, kiun ĝi sendas al la homaro. Ne estas tempo ripozi, ĉiam niaj fortoj estis ne sufiĉaj por komprenigi al la homaro la valoron de nia idealo. Mia kara amiko Llusera, venos aliaj generacioj, kiuj anstataŭos vin kaj min, kun nia espero, ke ili solvos la problemon.

Luis Serrano Pérez

Esperanto kiel energio kaj ne kiel ornamo.

La mondo estas nia patrolando kiam nur ekzistas unu lingvo por la komunikado inter la homoj. Ĝi estas tre granda kiam la homo rekonas, ke Esperanto estas portego malfermita por ke la homoj ne sentas sin fremduloj.

Esperanto ne nur estas lingvo sed energio, ĉar ĝi kondukas al la solidareco, frateco, amikeco kaj paco. Per ĝi ni sentas nin anojn de la mondo, ĉar ni rekonas geamikojn, do, ĝi ne estas fenomeno por detrui la nacilingvojn de ĉiuj popoloj.

Kiam vi lernas, studas, kaj praktikas Esperanton, vi akiras novan aeron por daŭrigi vivante pro la vivo, ĉar la homoj el la tuta tero komprenos unu la alian, kaj la estonteco povas aparteni al la novaj homoj kiuj realiĝos la granda sonĝo de la homaro.

La personoj kiuj sentas Esperanton en siaj koroj, ili estas esperantistoj, tiam komenciĝas la alia parto de nia vivo por nia ekzistado kiel tera homo.

La granda kunsido aŭ festo de la esperantistoj por ke ni revidu multajn el niaj geamikoj estas la tutmonda Esperanto-Kongreso. Tie renkontiĝos centoj da esperantistoj de ĉiuj landoj. Tiam kunsidos nek araboj, nek kubanoj, nek hispanoj, nek francoj, nek ĉinoj, sed nur homoj, kiuj diskutas fratece per unu lingvo.

Bonaj esperantistoj estas kiuj pagas volonte kaj kun plezuro sian kotizon, rekomendas la servojn de la lingvo al ĉiu, kiu povas ilin profiti, portas en sia poŝo propagandajn libretojn kaj instruas la lingvon al novaj interesatoj.

Esperanto ne estas ornamo ĉar ni povas uzi ĝin por la komunikado, informado, disvastigo kaj disvolvo.

Ĝi estas movado kie ni povas praktiki vivan lingvon por la kompreniĝo inter homoj kaj ni povas trovi familiojn, amikojn kaj hejmojn en ĉiuj landoj.

Kiel bela estas la mondo kiam geamikoj ĉie bonvenigas vin!

Ni bezonas Esperanton, ĉar ĝi estas parto de la historio kaj naskiĝis kun ni. Ĝi estas amo, pro tio apogi ĝian disvastigon, disvolvon kaj lernadon estos kontribuo al la mondpaco.

Se ni defendas Esperanton, ni savos arbon en la arbaro kie pro senscio de kelkaj homoj kiuj intencos bruligi ĉion, ili detruus ion kio apartenas al la vivo, tiam, ni devas zorgi kaj subteni la semojn de ĝi, por la kreskado de novaj arboj, ĉar la lingvo kiel la movado povas levi la animon, tiel, kiel la floroj povas stimuli revojn.

Lernu, studu, praktiku kaj parolu Esperanton por ke vi povas loĝi kaj eniri en Esperantio.

Rafael Cabrera Espinosa,
Prezidanto de Granam
Esperanto-Filio
kaj IM de UEA.



FUNDACIÓN ESPERANTO

Karaj amikoj:

Alproksimiĝas la fino de la Jaro Zamenhof, la 150-a datreveno de lia naskiĝo. Estas la momento doni la lastan elanon al tiuj aktivaĵoj por memori lin kaj informi pri lia verko.

Fundación Esperanto rezervis la buĝeton de helpoj por tiu ĉi jaro por financi agadojn ĝuste pri tiu datreveno. Ĝis nun ne alvenis formala peto de helpo. Ni do petas ke vi sendu al ni informojn pri via laboro farita aŭ planita, kies ĉefa celo estas la kunmemoro de la vivo kaj la verko de D-ro Zamenhof. Aliaj aktivadoj ne rilatantaj specife al la Jaro Zamenhof estas ankaŭ subvencieblaj se ili rilatas al la informado, disvastigo aŭ instruado de Esperanto

La helpoj estas ĉefe destinataj al grupoj esperantistaj agantaj en Hispanio, sed eblas subvencio al difinita agado organizita de unuopuloj aŭ neformalaj grupoj. Ekzemploj de agadoj estas ekspozicioj, eldonaĵoj, simpozioj, kursoj, informkampanjoj, kaj simile.

La limdato por la peto estas la 1-a de decembro 2009, kaj al ĝi devas esti aldonita informo pri la agado kaj konfirmiloj pri la elspezoj (kvankam tiuj ĉi povos esti senditaj post la konfirmo de la subvencio)

Viajn petojn sendu al Fundación Esperanto, Cadena 20-22, Zaragoza aŭ al fundacion@esperanto.es.

*Sede central: Cadena, 20-22, 1 izq. 50001-Zaragoza
Dirección en Madrid: Rodríguez San Pedro, 13, 3. 28015-Madrid
Teléfono/telefax: 91.446.80.79*

Vi povas kontribui al la agadoj por Esperanto per via donaco al Fundación Esperanto, en la bankokonton numero 2100-2149-31-0100165085 de la "Caja de Ahorros y Pensiones La Caixa"

NOTO PRI LA BRULEGO OKAZINTA EN LA KONSTRUAĴO DE LA SIDEJO DE HEF LA PASINTAN JULION

En la konstruaĵo kie troviĝas la oficejo de HEF en Madrido, okazis brulego frumatene pasintan merkredon la 29an de julio. Ĝi ŝajnas esti atenco, ĉar temas pri provokita brulego en la oficejo n-ro 3 de la dua etaĝo, kie nun estas sidejo de ekstremdekstra junulara organizo, sed oni ne certas pri kiu faris tion. La brulego kaŭzis grandan damaĝon en kelkaj oficejoj el la dua etaĝo, kaj en tiu etaĝo mem, sed ne atingis la trian, kie estas la HEF-oficejo. Tamen la tria etaĝo estas tute fumita kaj kvankam la HEF-oficejo estas tute sendamaĝa interne, la pordo restis makulita de la fumo. Do, preskaŭ okazis katastrofo, ĉar kvankam la HEF-oficejo havas asekuron rilate al la materialoj, kaj la datumoj de la komputiloj preskaŭ semajne estas kopiata por havi ĝin ekstere, la Biblioteko estas tute neanstataŭigebla. Félix Jiménez Lobo

Komuna Eŭropa Referenckadro: Kio ĝi estas?

[<http://www.edukado.net/upload/katalogo/1618.jpg>] forviŝi

En 1991 estis organizita internacia simpozio pri lingvolernado en la Svisa urbo Rüşchlikon. Oni konkludis ke necesas krei komunan kadron por faciligi agnoskon kaj komparon de niveloj, ĉar nuntempe ekzistas multaj atestiloj de diversaj lernoinstitucioj, kun siaj propraj takso-skaloj. Sekve la projekto estis disvolvigita sub gvido de la Konsilio de Eŭropo. En 2001, rezolucio de la Konsilio de la Eŭropa Unio rekomendis la uzon de la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER), konata en la angla kiel *Common European Framework of Reference*.

Tiu longa kaj kompleksa dokumento celas orienti lernantojn, instruistojn kaj lernoinstituciojn, ĉar oni intencas ke atestiloj de plej diversaj ekzamenantoj rilatu al egalvalora nivelo en la komuna kadro. Entute estas 6 gradoj de plej baza kapablo al kompleta rego (A1, A2, B1, B2, C1 kaj C2). La kriterio estas ne la vorto-stoko aŭ uzo de fiksitaj gramatikaj strukturoj, sed la kapablo kompreni kaj esprimi en diversaj cirkonstancoj. Aldone al tio oni nun povas vojaĝi ene de la Eŭropa Unio kun "lingva pasporto" (kun valoro simbola kaj de orientigilo, pli ol formala). Gravas noti, ke KER ne estas en si mem titolo aŭ diplomo pri lingvokono, nur priskribo pri kiu respondecas la ekzamenanto, ne la Konsilio de Eŭropo. Do, agnosko kaj prestiĝo de atestilo dependos de la institucio kiu liveras ĝin. En januaro de 2007 aperis versio de KER en Esperanto fare de Roel Haveman, kun skipo de provlegantoj kaj apogo de la porinstruista retejo www.edukado.net. La tradukon kaj eldonon financis Esperantic Studies Foundation kaj Fondaĵo Saliko. La versio en Esperanto estas rekonita de la Konsilio de Eŭropo kaj aperas listigita inter la alilingvaj versioj. Oni povas senpage legi ĝin en www.edukado.net aŭ en ties surpapa eldono fare de UEA.

Por organizi ekzamenojn kungruajn kun KER, UEA iĝis partnero de ITK (Hungara Ŝtata Lingvoekzamena Centro). En 2006 ITK, kiu delonge ofertas ekzamenojn pri Esperanto al hungaroj per dulingva testo, adaptis sian tri-gradan sistemon laŭ la eŭropa normo, ofertanta la nivelojn B1, B2 kaj C1. UEA ekde 2008 membras en la Asocio de Lingvotestistoj en Eŭropo (ALTE), reprezentantaj 26 lingvojn, kiu superrigardas la procedon por certigi la kvaliton. Nun eblas trapasi la tri-nivelajn ekzamenojn en la du grandaj eventoj: UK kaj IJK. En Bjalistoko ekzameniĝis 47 personoj el 20 landoj. Sekvaj ŝancoj estos septembre dum ARKONES (Poznano, Pollando) kaj jarfine en Germanio. Ĝuste samtipajn testojn oni povas trapasi en la hungaria centro, kaj ili tie havas ŝtatan agnoskon. Krom ĉi tiuj, daŭre ekzistas la klasikaj Internaciaj Ekzamenoj de UEA-ILEI, sufiĉe rekonitaj ene de la Esperantomovado, kvankam ne same bone ekstere. Ekzistas simila ekzamen-sistemo, bazita sur



KER, kiun kreis Kultura Centro Esperantista en Svislando (kiu ankaŭ havas rilatojn kun ALTE), ligita al Esperanta Civito, sed la diplomo ne estas akreditita de UEA aŭ ILEI. En la lasta Hispana Kongreso 10 homoj sukcese trapasis ĝin.

Konklude, la adapto de la Referenckadro estas provo montri ke Esperanto estas "serioza" lingvo, perfekte komparebla al aliaj. Ni strebu al C1-nivelon!

1. Hungara Ŝtata Lingvoekzamena Centro www.itk.hu (klaku poste sur la speranta stelo). Estas specimenoj de ekzamenoj kaj regularo.

Jorge Pavón

Letero al la redakcio

En la n-ro 386 de Boletín (januaro-marto 2009) publikigis 4-paĝa artikolo de Andrés Martín kun la titolo “Esperanta Civito”. La artikolo en si mem prezentas nenion novan, i.a. ĉar ĝi grandparte kopias informojn facile troveblajn en la retejo de la t.n. Esperanta Civito (<http://www.esperantio.net/>). Tamen povus okazi ke leganto de Boletín ne sufiĉe informita pri tiu iniciato ricevus malĝustan impreson pri ĝi. Tial, kaj por ke oni ne diru ke tiaj artikoloj aperas sur la paĝoj de Boletín pro manko aŭ nericevo de pli interesaj kontribuoj, mi verkas nun ĉi rapidan respondon al ĝiaj asertoj.

La Esperanta Civito (ekde nun EC) estas la bombasta nomo de grupo de individuoj kaj asocioj, kunigitaj de pseŭdoideologio pri esperanto kaj Esperantujo nomata “raŭmismo”. Ĝi estas bazita nek sur ajna principo de la moderna lingvoscienco nek sur la ideoj de Zamenhof, sed sur la ekstravagancaj kapricoj de ĝiaj iniciatintoj Valerio Ari (pli konata laŭ la nomo Giorgio Silber) kaj ĉi ties edzino Perla Martinelli. Ĉiaj referencoj al la moderna lingvoscienco, Zamenhof ktp estas nuraj bluoj kaj pretekstoj.

Forme EC imitas ŝtatan strukturon, kun “Parlamento” (konsistanta el “Senato” kaj “Forumo”), “Kortumo” (ia speco de tribunalo), “Kapitulo” (karikaturo de registaro konsistanta el unu “konsulo” kaj pluraj “vickonsuloj”) ktp. Verdire, iom tro da “instancoj” por “civitanaro” nombranta iujn centojn da adeptoj. Parenteze ni diru, ke en la 19-persona “Senato” membras unu hispano, Julio Herrero.

Por ke oni vidu la stilon de la EC-lingvaĵo (mi neas al ili la rajton akapari al si la senmakulajn vortojn “civita” kaj “civitano”), sufiĉas legi ekzemple la priskribon de la rolo kaj taskoj de la “Kortumo”: “Krom arbitracii kaj aŭtente interpreti normojn, la Kortumo estas vokita al grava tasko: prepari la Civitan Kodon, bazante sin sur la svisa”. Nura megalomanio!

Jen kial mi ne estas la sola persono trovanta en la ekstravagancaj tekstoj de la EC-retejo preskaŭ ĉiutagan fonton de miro kaj amuzo.

Tamen la ŝajna deliro je ŝtateco aŭ regneco de EC ne trompu onin. Silber kreis la “Civiton” kiel pretekston por grandigi kaj glorigi sian solan figuron. Ne hazarde en EC li jam ludis preskaŭ ĉiujn eblajn gravajn rolojn, kaj plu tenas en la mano la fadenojn.

La rezulto estas stranga sekto ene de la jam sufiĉe bizara kaj miniatura Esperantujo. Nekonscie, multaj EC-anoj orbitas ĉirkaŭ la nesatigebla umbiliko de frustrita egomaniulo, nome Silber. Koncerne la EC-aktivulojn (“senatanoj”, “vickonsuloj” ktp), miaopinie ili jam ridindigis sin por eterne akceptante havi postenon en tia fantomaĵo.

Plej bone estus ignori aŭ nur priridi ilin. Bedaŭrinde EC mem agas sufiĉe damaĝe ene de Esperantujo. Tial estas oportune, ke la membroj de HEF estu pli bone informitaj.

Fine mi menciui ke la verkinto de tiu artikolo, Andrés Martín, estas unu el la 5 membroj de la menciita “Kortumo”.

Jorge Camacho

Pri la apuda artikolo de Jorge Camacho

Mi ĝojas ke s-ro Camacho kvazaŭ vekigis el letargio kaj sendis kontribuon al *Boletín*, kvankam verŝajne de li la HEF-membraro atendus artikolon pri literaturo, kaj ne la kutimajn regurdaĵojn kontraŭ diligenta kolegaro, pri kiu li aspektas obsedita. Kiel prezidanto de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, mi klarigu koncize kial mi ne konsentas kun la enhavo de lia letero, kaj mi tute ĝojas ke AEU aliĝis (libere kaj spontane) al la Pakto por la Esperanta Civito; eĉ mi rekomendas la aliĝon al aliaj hispanaj esperanto-societoj.

La Pakto estas serioza konsorcio, al kiu aliĝis jam trideko da diversaj subjektoj el kvar kontinentoj: asocioj fakaj, landaj, regionaj, lokaj, lernejoj, kulturcentroj, eldonejoj, redakcioj, eĉ teatro. En tiu konsorcio regas tre bona etoso, kun reciproka respekto kaj kreskanta sinergio. Danke al la Pakto AEU povas: a) havi pli da internacia videblo: vidu la paĝojn dediĉitajn al la kongreso de Malago en *Literatura Foiro* kaj *Heroldo de Esperanto* b) organizi lingvotestajn sesiojn kaj progresigan perkorespondan kurson, kun nivelo kaj efikeco neniam spertita en Hispanio (kunlaboro kun Kultura Centro Esperantista en Svislando ekde ĉi tiu jaro); c) intensigi publikajn rilatojn kun neesperantistaj instancoj, danke al la vizitoj de eminentaj esperantistoj (ĝuste d-ino Perla Martinelli kaj prof. Giorgio Silfer), kiuj al sia granda klereco aldonas

fluan posedon de la kastilia lingvo; d) disponi je valoraj prelegistoj kaj artistoj por siaj aranĝoj (kiel okazis en oktobro 2005); e) iniciati la projekton de Esperanto-Domo en Andaluzio, kio tute ne eblus sen la ekstera apogo de la Esperanta Civito; f) konkrete kontribui al la kleriĝo de afrikaj esperantistoj (kunlaboro kun burundia societo en 2008).

Mi atentigas ke el la Esperanta Civito, kaj tute specife el la menciitaj geamikoj, neniam venis eĉ minimuma malafablaĵo kontraŭ HEF aŭ iu el ĝiaj gvidantoj.

subskribas: Ángel Arquillos López

La legantoj poemas

Amindumado

VI estas varma vento,
mia printempo,
mia fiero,
mia mevo kaj mia revo,
mia anĝelo,
mia ĉielo,
mia rivero,
mia penso,
mia peko kaj mia konfeso,
mia tento kaj mia pento,
amikeco, amo, espero,
mia fido kaj mia kredo,
mia kono kaj mia rekono,
demando kaj respondo....

Danica

Raporto pri la 68-a Hispana Kongreso de Esperanto okazinta en Malago de la 2-a ĝis la 5-a de julio 2009.

En la jaro 1889, urbo Malago (Hispanio), José Rodríguez Huertas estis la unua volapukisto kaj prezidanto de la loka societo kaj, kvankam mi ne kredas je mirakloj, okazis io eksterordinara. Li forlasis la komplikan lingvon por lerni kaj instrui Esperanton; kaj en la jaro 1892 li estis elektita loka prezidanto kaj eĉ verkis la unuan esperantan gramatikon por hispanlingvanoj en la mondo; en tiu momento Malago fariĝis pionira en Hispanio kaj la kvina Esperanto-societo en la historio.

Ĉi-jare, proksimume 120 jarojn poste, malaganoj havis la plezuron okazigi la 68-an Hispanan Kongreson de Esperanto kune kun la 14-a Andaluza Kongreso, kiujn ĉeestis homoj el la tuta lando kaj kelkaj eksterlandanoj. Entute kunvenis okdeko da geesperantistoj por ĝui interesan programon, el kiu nepras mencii kelkajn.



Pedro Hernández Prezidanto de HEF

Unue la prezentadon de la mondfama verko *Platero kaj mi*, de la Nobel-premiito Juan Ramon Jimenez, tradukita de la akademiano Miguel Gutiérrez Adúriz, kiu plenumis sian revon de antaŭ jaroj, kaj samtempe profitis la okazon prezenti sian verkaron *Sferoj*, kolekton pri scienc-fikciaj rakontoj, tre ŝatataj en Hispanio.

D-ro Wolfgang Guenther el Germanio, loĝanta en Rojales, provinco Alikanto, kiu artas en la t.n. Nula Horo, kaj ĉiujare eldonas interkulturan kaj skeptikan almanakon *Kiosko de Levante*, paroladis pri “Esperanto-ekologiaj, ekonomiaj kaj sociaj argumentoj por neŭtrala lingvo internacia”.

Luis Serrano, ĉefredaktoro de la revuo *Internaciisto*, vojaĝis el Katalunio por akompani nin kaj paroladi pri “Solidareco”. Li estas 82-jara, sed li tre agemas kun sia grupo KAE, kaj ĉiujare okazigas la jam mondfaman Internacian Semajnon de Kulturo kaj Turismo.

La vicprezidanto, nuntempe prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio (ĉar elektita dum la Kongreso), Pedro Hernández Úbeda, sperta pri slavaj lingvoj, paroladis pri la interesaj temoj “Denaskismo” kaj “Agadprojektoj de HEF”.



José Salgue-ro, instruisto en gimnazio, tre agema esperantisto ĉe SAT kaj SATEH, prelegis pri “La renkonto je la sperto diskutigi per eŭropuniaj ebloj kaj respondeco de geesperantistoj kiuj ne rekte enkadriĝas en lernejoj medioj”.



Dum reprezentado de Endimiión

Li kunlaboras kun portugaloj precipe. Tiele okazis jam iama AKEL, kiu estas projekto per kiu portugala, pola kaj hispana lernejoj kunvojaĝis antaŭ kelkaj jaroj; poste same okazis inter aliaj hispana, itala, brita kaj bulgara lernejoj, kaj nun denove hispana, italaj kaj portugala, laŭ projekto alinoma, sed simila.

Marciej Jaskot, pola esperantisto, kaj instruisto de la pola en la Universitato de Granado kie li portempe loĝas, konstanta kunlaboranto de la Esperanto-Redakcio de Pola Radio ekde 2004, efektivigis sonraportojn pri la Kongreso per intervjuoj surloke por la Pola Radio.

Augusto Casquero, tre agema esperantisto, enamiĝinta al Ĉinio, kie li instruas Esperanton de antaŭ kelkaj jaroj, amuzis la ĉeestantojn per alloga parolado pri “La ĉina edusistemo”, kaj, kiel kutime, post la parolado kaj kunridado, li disdonis suvenirojn el Ĉinio.

La malaga kantisto Eduardo Vargas *Sollo*, regalis nin per la projekciado de DVD pri muzika ludado.

Perla Martinelli paroladis pri “Virinoj en la Esperanta literaturo” kaj pri la grava poemaro de William Auld *La infana raso*: ambaŭ paroladoj akompanataj de bildoj kaj videoj. Ŝi estas tradukisto, diplomita instruisto, doktoro pri modernaj lingvoj kaj literaturoj, kaj studis ankaŭ desegnadon kaj grafikon. Ĉefredaktoro de *Literatura Foiro* (1980-1995), poste dum kelkaj jaroj de *Heroldo de Esperanto*, ŝi daŭre kunlaboras kun ambaŭ periodaĵoj. Ekde 2006 ĉefredaktoro de *Femina – revuo en Esperanto ne nur por virinoj*. Interalie ŝi reviziis kaj fintradukis, kun Gaston Waringhien, *Dekameronon* (unuajn tri Tagojn). Ekde 1989, membro de la Akademio de Esperanto, kies Ĝenerala Sekretario ŝi estis en 1996-99. Kunfondinto de la Esperanta PEN-Centro, senatano kaj lingva komitatano de la Esperanta Civito.

Rafaela Uruëña, naskiĝinta en Bilbao sed loĝanta en Valladolid, doktoriĝis pri juro en la tiea Universitato. Profesorino pri Internacia Juro kaj Internaciaj Rilatoj, ŝi specialiĝis pri Juro de la Eŭropa Komunumo, ŝi gvidis “Masters” kaj plurajn kursojn. Ŝi prelegis en IKU-sesioj de la Universalaj Kongresoj, kaj dum la pasinta Kongreso de la Eŭropa Esperanto-Unio en Mariboro (Slovenio). En Malago ŝi prelegis pri la nuntempa kaj tre interesa temo “Kial baloti en la Eŭropa Parlamento”.



Diplomitoj de baza kurso kun la prezidanto de AEU

Fatima Jiménez kaj Marie Quilly, hispana kaj franca amikinoj loĝantaj en Granada, kie ambaŭ studas en Universitato, proponis al ni tre allogajn momentojn per filmetoj en Esperanto kaj per belaj kantoj.

La Esperanto-Klubo de la Aksarkio, provinco de Malago, kuraĝis deklami (mi diras kuraĝi, ĉar la dancistino, kiu devus danci dum la deklamado, pro akcidento ne kunlaboris) belegan poemon pri Mitologio, titolitan “La sonĝo de Endimion”

Kiel kutime, okazis senpagaj ekzamenoj kaj kursetoj pri baza kaj meza kursoj, kaj dek enskribitaj homoj ekzameniĝis pri niveloj A1 kaj A2, laŭ LTSEC, gvidataj de Perla Martinelli kaj Andrés Martin.

Malgraŭ varmeĝo, la etoso estis, kiel kutime, amuza kaj la adiaŭo trista, sed kun la espero renkonti nin denove en la urbo Santiago de Compostela, kie okazos la 69-a Hispana Kongreso. La plimulto profitis la okazon ekskursi tra la urbo, vizitante senpage la Alkazon kaj la katedralon; kelkaj havis la



Intervjuo de EFE al la prezidanto de HEF

ŝancon travojaĝi la urbon en turisma buso. Kaj por definitive adiaŭi, grupeto da gejunuloj kaj ne tre junaj homoj tagmanĝis en alloga restoracio, apud la katedralo.

Ángel Arquillos

Edukado en Ĉinio



Historio

Radikoj de la sistemo de formala edukado en Ĉinio atingas almenaŭ la 16-an jarcenton antaŭ Kristo, la dinastion de Shang (1523-1027 a.K.). Dum tiu periodo edukado estis la privilegio de nur kelkaj elitoj, kaj plejparte ekzistis por neniu alia kialo ol por ‘produkti’ ŝtatajn aŭtoritatulojn. Tiutempe, la edukprogramo baziĝis je tiel nomataj ‘Ses Artoj’: ritoj, muziko, arkpafado, ĉaro-regado, historio kaj matematiko. Kvankam, bazita je instruado de Konfuceo (551-479 a.K.) dum la epokoj nomataj *Printempo kaj Aŭtuno* kaj *Militaj Ŝtatoj* (770-221 a.K.), la edukprogramo laŭgrade liberigis la vojon por la sistemo bazita je ‘Kvar Libroj’ kaj ‘Kvin Klasikstudoj’. Tiuj verkoj skizadis la principojn de socio kaj aŭtoritatoj, kodojn de persona konduto kaj kolektive difinis la filozofion de Konfuceo, kiu kaŭzis fundamentan influon al fakte ĉiuj aspektoj de la vivo, kaj certe al edukado, almenaŭ ĝis la Liberigo kaj kreskis je povo dum komunisma periodo komenciĝanta en 1949.

La sistemo, kiu edukis la elitklason estis determinata kaj firme subtenata, kaj por sekvontaj generacioj, la edukita elito baziĝis je amasa analfabetismo. La imperiaj aŭtoritatoj estis aktivaj je edukado nur se ĝi administris la variajn nivelojn de la imperia aŭ civil-serva ekzamenado, kiu estis uzita por selekti la imperiajn oficulojn. La ekzamenoj mem konsistis el eseaj demandoj, kiuj testis la komprenon de la kandidato pri la instruado de Konfuceo. La studentoj povis prepariĝi por tiuj ekzamenoj per enskribiĝo al privataj institucioj, tiel nomataj *shuyuan* (en la ĉina), kiuj ekzistis nur por prepari studentojn por la ekzamenoj por civila servo. Unu rakonto travivis dum generacioj, traktanta la malfacilecon kaj konkurencon en tiuj ekzamenoj: la ambicia vilaĝano komencis prepariĝi por la ekzamenoj en la frua junaĝo kaj ne sukcesis esti akceptita ĝis kiam li iĝis 54-jaraĝa. Antaŭ ol esti akceptita li porlonge estis malestimigita de la familianoj kaj amikoj – finfine lia sorto ŝanĝis tiom drame ke li freneziĝis pro ĝojo.

Do, ni povas vidi ke Ĉinio havas historion de selektado de talentoj tra naciaj ekzamenoj kaj tiel la civitanoj traktis la gravecon de ekzamenoj tiom altestime.

: *Hodiaŭ*

Nuntempe Ĉinio havas nacivastan sistemon de publika edukado, kiu inkluzivas bazlernejojn, mezlernejojn (junioran kaj senioran), kaj universitatojn. Naŭ jarojn de edukado estas teknike devigaj por ĉiuj ĉinaj studentoj. La edusistemo garantias senpagan bazedukadon dum ses jaroj (iuj provincoj povas certigi nur kvin jarojn por bazlernejo sed kvar jarojn por la mezlernejo), komencante je la aĝo sep aŭ ses, sekvantan per ses jaroj de la mezlernejo por studentoj 12-18 jaraĝaj. Je tiu nivelo estas tri jaroj de la ordinara mezlernejo kaj tri jaroj de la alta lernejo. La Ministerio pri Edukado raportis 99% da frekvento por bazlernejoj kaj 80% por ambaŭ baz- kaj mezlernejoj. Ekde kiam senpaga edukado estis abolicigita en 1985 la kandidatoj al kolegioj kaj universitatoj devas konkuri por stipendioj bazitaj je akademias eblecoj. Privataj lernejoj estas permesitaj ekde fruaj jaroj de 1980.

Baza edukado:

Baza edukado en Ĉinio inkluzivas antaŭ-lernejan edukadon, bazedukadon kaj regulan mezlernejan edukadon.

Antaŭlernejo, aŭ infanĝardeno, povas daŭri ĝis tri jaroj, kun infanoj partoprenantaj ekde aĝo tri ĝis aĝo ses, kiam ili kutime eniras baz-lernejon. La akademia jaro estas dividita je du semestroj.

La mezlerneja edukado estas divigita je akademia mezlerneja edukado kaj specializita/profesia/teknika mezlerneja edukado. La akademia mezlerneja edukado konsistas el akademias malsupraj kaj supraj mezlernejoj. La studentoj finantaj la malsupran mezlernejon kaj dezirantaj daŭrigi la edukadon submetas sin al la loka administrita enirekzameno, sur kies bazo ili havos eblecon aŭ daŭrigi en la akademia pli supra mezlernejo aŭ eniri la profesion mezlernejon. La profesias mezlernejoj ofertas 2- ĝis 4-jardaŭrajn programojn kaj trejnas meznivelajn laboristojn, farmistojn, krome estradan kaj teknikan dungitaron. La teknikaj lernejoj normale ofertas 4-jarajn programojn por trejni mezprogresintan dungitaron. "Lernejoj por Lertaj Laboristoj" kutime trejnas studentojn post juniora mezlernejo por postenoj postulantaj la spriton en produktado kaj operaciado. La trejnado daŭras normale 3 jarojn.



Alta edukado:

Alta edukado je subgrada nivelo inkluzivas 2- kaj 3-jarajn juniorajn kolegiojn (ofte ankaŭ tiel nomataj mallong-ciklaj kolegioj), 4-jarajn kolegiojn kaj universitatojn ofertantajn programojn en ambaŭ akademia kaj profesia studoj. Multaj kolegioj kaj universitatoj ankaŭ ofertas programojn gvidantajn al akiro de magistra aŭ doktora gradoj.

Ĉina alta edukado je subgrada nivelo estas dividita je tri-jaraj kaj kvar-jaraj programoj. La unua estas ofertita ne nur ĉe mallong-cirklaj kolegioj, sed ofte ankaŭ ĉe kvar-jaraj kolegioj kaj universitatoj. La lasta estas ofertita ĉe kvar-jaraj kolegioj kaj universitatoj sed ne ĉiam tio gvidas al bakalaŭriĝo.

Multaj eblecoj de alta edukado kreas ankaŭ la ĝeneralan kategorion de edukado por plenkreskuloj.

La kategorio de edukado por plenkreskuloj kongruas kun ĉiuj tiuj supre menciitaj kategorioj. Porplenkreskula bazedukado inkluzivas Bazlernejojn por Laboristoj, Bazlernejojn por Kampanoj kaj skrib-kaj legkapablajn klasojn. Porplenkreskula mezlerneja edukado inkluzivas radio- kaj televidspecializigitajn mezlernejojn, specializigitajn mezlernejojn por kadroj, specializigitajn mezlernejojn por dungintaro kaj laboristaro, specializigitajn mezlernejojn por kampanoj, instruad-trejnadajn lernejojn kaj korespondad-specializigitajn mezlernejojn. Porplenkreskula alta edukado inkluzivas radio/televidajn universitatojn, kadrajn institutojn, kolegiojn por laboristoj, porkampanajn kolegiojn, korespondadkolegiojn kaj edukadkolegiojn. Plejparto de la supremenciitaj ofertas ambaŭ tri-jarajn mallongajn edukprogramojn; nur kelkaj ofertas subgradan edukprogramon.

Pozitivaj kaj negativaj flankoj de ĉina edukado

Pozitivaj:

1. Longaj studadhoroj \approx bonegaj kapabloj en testprenado
Ĉina studentaro, kreskanta ĉe la skribotablo, estas tre lerta je ekzamenado, kiu kontrolas la bazan scion. La studentoj estas lertaj je enmemorigado de la teorioj kaj tre rapidaj dum solvado de matematikaj problemoj. Tial la ĉinaj studentoj superigas la aliajn en ĉiaspecaj internaciaj ekzamenoj kiel ekzemple IELTS kaj GRE, eĉ se la taskoj estas en fremda lingvo kaj la test-preparantoj ne estas ĉinoj.

2. Longaj studadhoroj \approx pezlabora etiko
En alta lernejo (kaj eĉ en junia alta lernejo), plejmulto de ĉina studentaro studas ĝis la fino de la studhoroj. Ili estas alktimigitaj al longaj horoj de solvado de matematikaj problemoj aŭ skribado de eseoj ĉe la skribotablo, kio preparas ilin por peza labor-mondo kiu atendas la plejmulton de ĉinaj laboristoj, la profesiajn kaj la blukolumulojn. Jaroj de nokta studado iĝas la realeco de kromhoroj ekde kiam la tipa ĉino komencas laborvivan.

Negativaj:

1. Troa koncentriĝo je libroj, ne praktiko

Ĉinoj strebas al alligo de la graveco al superaj rezultoj kaj la studentaro estas facile dividita al diversaj klasoj laŭ rezultoj. Tio montras, ke pri multaj aferoj decidas nur rezultoj, kiel ekzemple ‘triobla-A’ eminenta studento, kolegia agnosko kaj ŝatado. Konsekvence, la studento ligiĝas al siaj libroj por akiri altajn rezultojn, multaj el ili iĝas eĉ ‘librotineoj’, multaj eĉ fraŭdas en la ekzamenoj. Sendube, tiu ĉi speco de la nur-libra kaj nur-porrezulta edukado havas larĝan fendon kun socia praktiko. Pro tiu kialo multaj studentoj trovas la malfacilaĵojn dum eniro al la socia aktivado kaj reala negocmondo post la gradiĝo.

2. Troa koncentriĝo je la scio mem, ne kiel gajni ĝin

Kompare al studentoj de evoluiĝantaj landoj, la ĉinaj studentoj estas pli pasivaj kaj malpli kreemaj. Kial? Pro la rezult-orientiĝo, la studentoj ne estas kuraĝigataj al demandado sed al memorigado. Instruistoj kaj gepatroj zorgas pli pri ‘Kion vi ellernis hodiaŭ?’ anstataŭ ‘Kiel vi ellernis tion?’. Kun bedaŭro oni rimarkas multajn ĉinajn studentojn kun alta intelekta kvociento sed malalta emocia kvociento! Ĉinaj studentoj estas alcutimigitaj doni la ‘oficialan respondon’ al la demando, pro tio ke oni postulas de ili enmemorigi la ŝlosilajn respondojn por la testo. Ili strebas lerni pasive anstataŭ pensi kree kaj kritike.

3. Troa koncentriĝo je gravaj aĵoj, per mallarĝaj horizontoj.

Por travivi en moderna socio, la devo de kompetenta persono estas havi larĝajn horizontojn. Sed la realeco en la ĉina edukado estas vere frustriganta. Ekzemple, okazas ke la medicina studento scias nenion pri la filozofio, historio aŭ arto.

4. Troa ŝarĝo por permesi al la studentoj vere interesiĝantaj lerni mem.

Ĉinaj studentoj ricevas tiel multe da hejmtaskoj kaj premo ke ili akceptas la studadon kiel ŝarĝon. Ili estas pasivaj studentoj alcutimigitaj al konvenciaj vojoj de pensado. Estas tre kredebla ke kiam ili forlasos ilian studentecon, ili fuĝos de la montoj de libroj por ĉiam. Vivlonga studado estas do pli universala en okcidenta mondo ol ĝi estas en Ĉinio.

Dum mia laboro instruante hispanan lingvon kaj Esperanton en Ĉinio mi konstatis ke ĝenerale ĉinaj lernantoj estas bone disciplinitaj kaj diligentaj. La konduto ĉe la klasĉambro estas sufiĉe bona. Ili bezonas iomete pli ta tempo por akiri fremdajn lingvojn ol okcidentuloj, ĉefe pro la granda malsimileco de la ĉina lingvo kun la eŭropaj. Tamen tio ne montras ke ĉinoj estas malkapablaj. Same okazas en okcidento por lerni la ĉinan. La instruteknikoj en Ĉinio devas esti adaptitaj al la loka kulturo kaj metodoj.

Augusto Casquero

EEU KONGRESO EN HERZBERG

La 8a Eŭropa Esperanto-Kongreso okazis ĉijare en la bela germana urbeto **Herzberg**, kien ni alvenis la 27an de majo. En la momento atingi la stacidomon, ni jam restis surprizitaj, ĉar apud la nomo de la urbo, aperis ankaŭ la kromnomo “la Esperanto-urbo”.

Antaŭ vojaĝi tien ni jam sciis ke Herzberg estis nomata “la Esperanto-urbo” sed ni



ne pensis ke tiu titolo kunportos ke pluraj indikiloj en la urbo aperas en Esperanto, ke en pluraj restoracioj, ni povis mendi la manĝaĵojn per la “esperanto-karto” tio estas la tuta karto de la restoracioj tradukitaj al Esperanto, kaj konsekvence ke en kelkaj restoracioj la deĵorantoj salutis al la esperantistoj en nia “komuna lingvo.”

Jam promenante tra la centro de la urbo, en la fasado de la malnova urbodomo,

nuntempe la turisma oficejo, aperas granda titolo kun la frazo “*Bonvenon en Herzberg, la esperanto-urbo*”.

Eĉ la Urbestro de Herzberg, S-ro Gerhard Walter, estas tre favora al Esperanto, kaj akompanis la kongresanojn dum la inaŭguro kaj en aliaj momentoj.

Se al tio ni aldonas ke la Urbestro, kiu venis inaŭguri la Kongreson estas, kiel dirite, tre favora al Esperanto, oni povas kompreni ke ni sentis nin ekde la unua momento en esperanta etoso.

Sed ankaŭ ni devas agnoski ke ĉio antaŭe dirite estas sukcesoj de pluraj laboremaj esperantistoj, kiuj ekde S-ro Giessner, jam forpasinta, ĝis la nunaj Peter Zilvar, Zsófia Kóródy kaj aliaj kiuj fervore aktivis tiucelen.





Pri la Kongreso, okazinta en moderna Gimnazio, ni elstarigos diversajn interesajn prelegojn, ĉefe tiun de D-ro Sean O’Riain (Prezidanto de EEU), teatran vesperon tre amuza pri “Münchhausen, la vera kazo” (pupteatro), la koruson *Szená-Torok* de la hungara parlamentanoj, la infanan dancensemblon el Toruno, ktp. La unua rigardo tra la urbo, ni faris komune, gvidataj de lokaj esperantistoj kiuj kondukis nin al diversaj stratoj por vidi la multajn belajn tramdomojn, la kastelon

kaj ĝian muzeon kaj esperantan ekspozicion.

Sur la foto, mi aperas kun S-ro Rynduch, kiu ekspoziciis en Herzberg tre interesan kolekton da esperantaĵoj.

La dimanĉon 31an de majo, okazis en la urbo grava evento. La urba festparado kun diversaj kostumoj kaj flagetoj kie partoprenis la tuta loĝantaro, piede kaj surĉare, la ĉasistoj, bele vestitaj, kaj kie ankaŭ partoprenis la esperantistoj, kiuj por elstari kunportis verdajn pluvombrelojn kun la vorto “Esperanto”. Komence kaj fine de la parado, kiu trakuris la tutan urbon, estis blovmuzikistoj. Sur la foto oni vidas la verdajn pluvombrelojn antaŭ la komenciĝo de la parado.

Ankaŭ estis tre interesaj la ekskursoj programitaj por la kongresanoj: Unue, buse, al la urbo **Goslar**, trapasante la Harz-montaro, kie ni haltis por foti, en la plej alta pinto de la montaro. Tiu ĉi urbo estas tre bela kaj grava, havas imponan kastelon, kaj pro ĝia historio kaj bona konservado, estis deklarita de Unesko monda kultura heredaĵo. La alia estis trajnekskurso al **Braunschweig**, kun gvidado, kie ni vizitis la mondfaman muzeon kaj la malnovan historian urboparton.

Fine, mi devas diri ke la 8a Eŭropa Esperanto-Kongreso okazis samtempe al la 86a Germana Esperanto-Kongreso, en la sama ejo, kaj sub la slogano “*Esperanto por multkultura Eŭropo*”, alloga slogano ĉar en ili partoprenis esperantistoj el 28 landoj.

Resume, tre interesa restado en Herzberg am Harz, kaj mi konsilas al la esperantistoj kiuj deziras vivi en vera esperantista etoso, viziti tiun germanan urbon.



Rafaela Uruëña

DOÑANA 40-JARA

Antaŭa parto publikigita en "Boletín" N° 387 Aprilo/Junio 2009

Daŭrigo

Danke al la aĉeto de aliaj bienoj kaj al la deklaro kiel Parko, oni bremsis la elakvigon de la marĉejo kaj oni evitis amasan plantadon de eŭkaliptoj kaj la disvolvon de Matalascañas, deklarita de nacia turisma intereso en la 70-aj jaroj.

La unua kanaligo de Guadimar okazis en la jaro 1947, venis aliaj, kiel la nomataj arbo-faligado de La Torre kaj de Oriente por faciligi navigadon tra la rivero Guadalquivir, kio izolis kaj ankoraŭ daŭras la marĉejon de la akvoj de la rivero. La ĉesigo al la antikva abundo de natura enmarĉegita akvo alvenis en la jaro 1971 kun la aprobo de la Plano Almontes-Marismas. La iniciato, deklarita de nacia intereso, celis transformi 45,000 areojn de marĉejo, vesprejo kaj monteto mediteranea de la centro de Doñana, en irigaciaj kultur-grundoj, pumpate subterajn akvojn de la akvo-hava tavolo 27.



La saman jaron WWF sin oponis al la iniciato kaj aĉetis 50 pliajn marĉejajn areojn, en la koro de Doñana kiujn oni aldonis al la proprieto de la Rezervo Biologia de Guadimar, Malgraŭ la elakvigo de la menciita Plano, defendan-

taj de la FAO kaj la Instituto de Reformo kaj Disvolviĝo Agrara (IRYDA), perdiĝis ĉirkaŭ 15,000 areoj, tiu perdo signifis gravan transformon. Malaperis akvo, vivo kaj ekosistemoj integritaj, oni malfermis la pordon al intensiva agrokulturo en la ĉirkaŭaĵo de la Parko. En 1974 unu el la ĉefaj arterioj kiuj alportis akvon al la marĉejo, la akvofluo de Guadimar, estis nuligita por permesi ĝian elakvigon kaj novajn kultivadojn.

NI SAVU DOÑANA-N

Tiom da elakvigoj, kanaligado, malfermo de putoj, kaj transformoj, reduktis la surfacon de la marĉejo je 30,000 hektaroj. Zorgante por la futuro de Doñana en 1988, WWF kaj la UIN kreis internacian komisionon de spertuloj pri hidrogeologio, kiu konsistis de G. Hollis, Pierre Heurteaux kaj James Mercer. Ili vizitis Doñana-on en oktobro samjara, kaj konkludis neblan la daŭrigado de ties agadoj. (Iliaj 40 konkludoj kaj 23 konsiloj estis publikigitaj en *Panda* 27.) La sekvantan jarojn la registaro de Andaluzio kreis la Parkon Naturan de Doñana, kio estis vera subteno por savi la maksimuman protekton de la Nacia Parko.

Iom poste, kaj malgraŭ la konsiloj de WWF, aperis urba projekto, Marbordo Doñana. Al sciencistoj kaj konservuloj aliĝis nekredebla socia respondo kaj miloj da personoj konvokitaj per la Platformo *Ni savu Doñana-n*. Pli ol 150 sociaj organizaĵoj, sindikataj kaj politikaj sin manifestis en multaj lokoj. La protesto paralizis la hotelan projekton kaj rezidejan, io tre grava por ke hodiaŭ ekzistu pli ol 60 kilometroj de strando sen urbanizado. Ekzemple, je la komenco de la 90-aj jaroj oni konstatis, ke la malsano hemoragia viruso, kiu mortigis la kuniklojn de Doñana, kaj plej malgaje, aperis sabotoj kaj venĝoj; iuj nekonatuloj bruligis la kontraŭ-incendiajn veturilojn de la parko, aliaj ŝtelis la dokumentojn pri neleĝa ĉasado. Cele trovi solvon por la estonteco, la Aŭtonoma Registaro de Andaluzio kunvokis internacian komisionon de spertuloj kaj oni redaktis, Informon pri: Estrategioj por la Disvolvigo Socio-Ekonomia Subtenebla pri la Ĉirkaŭoj de Doñana. Ĝi estis la unua plano pri disvolvigo subtenebla en la distrikto.



DOÑANA

ENVENENIGITA

La protektado de la spaco ampleksiĝis en la ĉirkaŭaĵo. Sed nenion validis la avertoj faritaj de ekologiistoj pri la akvoj devenantaj de minejo en la norda parto de la Parko, ĉar en la mateniĝo de 25-a de aprilo 1988,

rompiĝis la bariero de la marĉejo, kiu entenis la toksajn restaĵojn de la entrepreno Boliden, en Aznalcóllar. Tri milionoj da tunoj el kotoĵo, ŝlimaĵo kaj kvar milionoj da kubaj metroj da acidaj akvoj infektis la riveron Guadiamar kaj alvenis ĝis la pordo de la Nacia Parko. Tio plej urĝa estis forigi la slimaĵojn toksigajn, kaj atenti pri eblaj pluvoj antaŭ aŭtuno, por eviti ke la infektado etendiĝu al la tuta marĉejo. Cele, ke la diversaj administracioj de lando, rapidigus ĝian purigon, WWF Hispana kolektis pli ol 30,000 subskribojn, pere de la revuo *Panda*.

La novaĵo estis diskonata tutmonde, kaj kelkaj oficejoj de WWF kolektis monon por ke la hispana organizaĵo povu havi dosieron pri ĝenerala informado rilata al akcidento kaj postuli al UE prenu rimedojn en ĉi tiu kaj en aliaj zonoj, kun problemoj de granda risko, Jaron poste oni pretigis agado-planon, cele eviti la toksigon provokita per la eltiro de metaloj kaj en 2002 WWF hispana prezentis sian informon: **Minejoj de Doñana**, per kiu oni avertis pri la risko kaj konstanta kontrolo.

DAŬRIGOTA

La naskiĝo de du popolaj versoformoj

Dum la regado de la emiro Abd-Allāh (844-912), unu jarcento post la ekrego de la unua al-andalusa omaĝo, en unu el tiuj periodoj en kiuj la popolo ne plaĉe akceptis la ekscesojn de la Kordova povo, naskiĝis tute originala versoformo nomata **moaŝaho** (1).

Disvastigis tiun novaĵon Julián Ribera en 1915, kaj post studo de antikvaj manuskriptoj konfirmis tiun naskiĝon antaŭ ne longe, tri prestiĝaj arabistoj: la ĉeĥo R. Nykl, la egipto Abd al-Ahwani kaj la hispano Emilio García Gómez, kiuj certigis, ke laŭ Ibn Bassām el Sevileno en 1109, kaj al-Hiyārī el Gvadalajaro en 1106, ambaŭ citis kiel realaj la ekziston de du poetoj loĝantaj en Cabra (dek kilometroj sude de Kordova), kiuj inventis tiun poezian versoformon, prezentanta tri revoluciajn novaĵojn, gravaj unikaĵoj tiuepoke:

- a) Mallongaj versoj (la araba metriko konsistis el sufiĉe longaj versoj).
- b) Versoj grupigitaj laŭ strofoj kun ŝanĝiĝantaj rimoj (ne kiel la unurima kasido araba).
- c) La poemoj verkitaj en la araba havis ĉe la versofinoj esprimojn en la hebrea aŭ en la romanca lingvoj. Tiuj versofinoj estis nomataj harĉoj kaj ofte estis recitataj aparte de la poemo-kerno.

Tiu **moaŝaho**, se kantata aŭ pli dialekte skribita, estis nomata **zeĝelo**, kiun kelkaj arabistoj opinias, ke ĝi estis inventita multaj jaroj poste kun similaj elementoj kiel tiuj de la moaŝaho. Jen ekzemplo de tiu verso-formo verkita de la mistika poeto Granadano As-Sustari:

Jen la lum' de l' bona vojo
brilis por mi en la koro.

Ŝprucis suno el konceptoj,
kaj la lum' el perfekteco,
vibris en mi kiel vero
kun intenso kaj fervoro.

Jen la lum' de l' bona vojo
brilis por mi en la koro.

1 Moaŝaho: (Ar. Muwassaha, vorto kiu tra wisah kaj wassaha signifas “leda zono ornamita per inkrustaĵoj”): Versoformo inventita, laŭ kelkaj prestiĝaj arabistoj, de Muqaddam ibn Mua’fa aŭ de Mūhammād ibn Hammud al Cabri “la blindulo”, (de Cabra, proksime al Kordova). La inventintoj estis favoratoj de la emiro Abd Allad (888-912). La moaŝaho estis versoformo verkita en la klasikaj araba lingvo, kaj kutime uzata en popolaj medioj.

Mi aspiras l' Amatinon.
Li dorlotis min plej plaĉa,
metis min survoje ama
laŭ mia sentiva volo.

Jen la lum' de l' bona vojo
brilis por mi en la koro.

La plej prestiĝa verkisto de zeĝeloj estis Abd al-Malik ibn Quzmān, naskiĝinta en Kordova en la jaro 1078, aŭtoro de kompleta verko, *Kanzonaro*. Jen unu el la poemoj, en kies teksto li montras altan memestimon pro lia kontribuo al la perfektigo de la zeĝelo

La zeĝelon, grandtrezoron,
elpurigis mi je nodoj.

El zeĝelo senesprima,
faris mi alian brilan,
kiel orjuvel' fascina
riĉa pri sonorparoloj.

La zeĝelon, grandtrezoron,
elpurigis mi je nodoj.

Kiom belas ĉi zeĝelo!
Kiel ĉarmas ĝia teksto!
Loge sonas en orelo
freŝa stilo kaj dolĉ-vortoj.

La zeĝelon, grand-trezoron,
elpurigis mi je nodoj.

De l' zeĝel', sultano mia,
mi fariĝs plengenia,
dum zeĝelo mia brilas,
la ceteraj kaŝas honton!

2 Zeĝelo: Versoformo konsistanta el du oksilabaj versoj unurimaj, kiuj funkcias kiel refreno. Poste, tri unurimaj versoj, kaj la kvara rimanta kun tiuj de la refreno Laŭ plej elstaraj kompetentuloj pri la temo, la zeĝelo influis en la naskiĝo de la provençala poezio, precipe tiu de unu el la plej konataj trobadoroj, Vilhelmo de Poitiers, duko de Akvitanio. Ankaŭ ĝi multe influis en la formiĝo de la okcidentaj liriko.

La zeĝelon, grandtrezoron,
elpurigis mi je nodoj.

Laŭ dedukto de kompetentaj arabistoj per aludoj en poemoj de Ibn Quzmān, tiujn zeĝelojn oni kutimis kanti ne nur fare de unu sola kantisto, sed kun popola partopreno, kvazaŭ ĥoro, kaj la publiko ripetis la refrenon ĉiu-foje ke la kantisto atingis la kvaran ŝanĝo-VERSION de ĉiu strofo.

Tiu kantonovaĵo multe amuzis la popolon, ĉar variigis la rigoron de la unurima araba kasido, nur recitata en palacoj, bienodomoj kaj lirikaj fakaj medioj.

Kun la pasado de l' tempo, la simpla popolo, ripetis unu kaj alia fojo tiujn versopecojn, kaj ne ĉiam en la araba lingvo, sed plejofte miksitaj en la romanca aŭ hebrea, kaj tio enkondukis al la formiĝo de poemetoj nomataj harĉoj, tiel antikvaj —diris la eminenta erudikiulo Ramón Menéndez Pidal, “ke la poemo de *Mio Cid* (12a jarcento) ŝajnas kvazaŭ verkita antaŭhieraaŭ.

La plezuro kiun vekas en la leganto tiuj primitivaj poemetoj, estas kio impulsis min sekvi la vojon de la menciitaj scienc-esploristoj por transdoni al vi version en Esperanto pri tiu duonkaŝita ĝardeno de l' pasinto, kie kreskis la plej delikataj floroj de la hispana liriko apenaŭ naskiĝintaj, pri la temo ĉiam interesa kaj kelkefoje pasia de la homa amo. Al tiuj el miaj legantoj, kiuj bone scias la historion pri la originoj el nia Liriko ekde ĝia naskiĝo, mi petas senkulpigon, ĉar mi ripetis tion, kio ili ja bone konas. Efektive, tiuj menciitaj poemetoj, plejofte parolis pri amo. Jen unu el la plej primitivaj, en kiu konstateblas la arabaj vortoj miksitaj al la romancaj:

Vayse meŭ coraçon de miĉ,
Ya, Rab, ĉsi me tornarad?
ĴTan mal meŭ dolor li-l-habid!
Enfermo yed, ĉCuándo sanarad?
Kies tradujo estas:
Mia kor' el mi forkuras,
Ho Di' ! ĉu ĝĥ revenos?
La dolor' al mi torturas
Pro l' amat', ĉu li bonvenos?

(3) *Harĉo*: Vorto el araba deveno, kiu ricevas la lastajn versojn sur la lasta strofo de moaŝaho. La egipta poeto Ibn Sanā al-Muliq (1155-1211), en sia prilirika regularo difinanta la “*jarayya*” indikas, ke ĝi devas esti skribita en la araba vulgara aŭ en la lingvo romanca. Nur nome oni konis la harĉon ĝis kiam Stern en 1948, kaj García Gómez en 1952 malkovris dudek-kvaron el ili.

Ekzistas multaj poemetoj kiel ĉi tiu, kies traduko montriĝas pli ol malfacila, sed la problemo ne kuŝas en la miksaĵo de lingvoj, sed en la traduko de popolaj dialektoj, kelkaj pli influataj de la araba kaj aliaj de la romanco el la diversaj regionoj.

Antonio Marco Botella

Daŭrigo

Pasas jarcentoj: Navara kaj Bearne estis memstaraj regnoj, hodiaŭ ili estas membroj de potencaj ŝtatoj. Kun tiuj ĉi, ili trapasis militadojn, revoluciojn, diktatorojn; ili estas laŭtempe absolutaj monarkioj, konstituciaj regnoj, Respublikoj.... Sed, ĉu pace, ĉu dummilite, vivas la lando, ĉu tiuj ĉi aŭ tiuj aliaj ŝtatestroj estrus ilin, ĉiujare, la 13an de julio la Pirineaj montoj reflektas la allogan parolon –atestanto de l' pasinteco, heroldo de la estonteco:

Pax avant! (Paco antaŭen!)

Kaj ni daŭrigas priskribante la kunlaboraĵojn de Amalia kun la citita E-gazeto:

- “Pri hungara kaj hispana fabelo” de Timoneda (traduko)
 - “Vulzio” –elegio de Hegesippe Moreau (franca poemo) –traduko-
 - “Birdina Amo” (rakonteto).
 - “Jubileo” (rakonteto pri kiel ŝi enamiĝis kaj volis lerni Esperanton).
 - “Krimulaj kuniklmurdistoj” (kritika rakonteto).
 - “La Lernejo” de Anatole France (traduko).
 - “La Cid alvenas al Burgos” (poemo tradukita).
 - “Lope de Vega” (traduko de biografio).
 - “Du malnovaj rakontoj” de Timoneda (traduko)
 - “El la palaco de la perloj” poemo de F. Villaespesa (traduko)
 - “La tri ŝpinistoj” de Luis de Zulueta (traduko)
- Kaj denove plian originalan poemon:

() Mi reproduktas ĉi tiun rakonton, ne nur ĉar estas verkita de Amalia, sed ankaŭ ĉar dum la jaroj sesdekaj, la Aragona E-Centro Frateco de Zaragozo, estis invitita al tiu ceremonio, kaj aŭtobuso plena de zaragozaj geesperantistoj ĉeestis tie. Plaĉe mi rememoras tiun ekskurson ĉar tiu kvazaŭ legenda ceremonio estis tre bone reprezentata. Se al tio oni aldonas la agrablan etoson inter la protagonistoj de tiu kvazaŭ rito, la belecon de la montaro kaj la harmonion kiu regis dum la renkontiĝo, ankaŭ kun francaj geesperantistoj, oni povas resumi, ke tiu estis unu el la plej bonaj ekskursoj kiuj tiam oni organizis en nia Esperanta Rondo.*

SIRINGOJ! SIRINGOJ!

Florsimbolo: unua amemocio.

Freŝa siring’ ornamanta
mian tablon dum labor’,
ho, kiom da rememoroj
vekas en mi via flor’!

Lancoj formas la folioj
kaj krucetojn la petal’,
krucetoj de Fastotempo
etaj lancoj de batal’.

Vin vidante, mi la scenojn
infantempajn revas tuj
kiam lerte mi surgrimpis
al maljunaj siringuj’.

Kaj sub kiso de la suno,
meze de flor’ kaj foli’
ravis min la nekonata
“Unua amemoci’ “

Mi rekte grimpas plu sur l’ arbon
nek sopiras antaŭ viv’;
sed de juna tempo estas
via parfum’ elvokiv’.

Kaj, laŭ dum la dolĉaj jaroj
jam pasintaj pro domaĝ’,
kantas vi pri am’ kaj revoj
kaj printempo kaj junaĝ’.

En 1932 la poezio de Amalia estis plej alte estimata, ĉar oni akceptis publikigi ŝiajn poemojn en la plej bona gazeto de la esperantista tiama gazetaro *Literatura Mondo*, kiu publikigis du poemojn: “**Stelara Voĉo**” kaj “**Nokta Bildo**”. Kaj en decembro de 1933 tiu sama gazeto publikigis “**Dum novembra aprilo**” kaj “**Kvazaŭ formikoj**”, tiuj poemoj menciitaj estis elektitaj de Kalman Kalocsay por la eldonota verko “**Dekdu Poetoj**”, kiu efektive aperis en 1934, grandparte el ili aperintaj kelkaj jaroj poste ankaŭ en la grava verko *Esperanta Antologio* (1984).

Unu el la dekdu poetoj elektitaj estis Amalia Núñez Dubús, kies originalaj poemoj, eble la plej bonaj, kiujn ŝi verkis, ĉi-sube ni plaĉe reproduktas:

RIVERO

Ĝi ne plu rememoras sian subteran kuron,
sed kun plezur' memoras sian naskiĝan fonton
inter la rokoj, kiam la vastan horizonton
unue ĝi ekvidis, kaj la ĉiellazuron.

En kia marŝ' freneza ĝi rapidante bruis
tra denso de filikoj, kantante vivoĝojon,
per kia fort' la ŝtonojn kaj trunkojn ĝi ekskuis,
petante de l' Naturo liberan kuro-vojon.

Rebrilis ĝiaj ondoj pro l' sunobril' junia,
ĝis fundo elsekigis ĝin la somera varmo,
kaj dum la vintra nokto, kruela kaj glacia,
la frost' katenon metis al ĝia ondo-svarmo.

Sed kiam la katenon sezono nova rompis,
kaj liberiĝis vigla la muta suferanto,
ĝia ridanta fluo denove punte pompis,
kaj ĝia ŝaumo bruis per gaje laŭta kanto.

La dornojn kaj la florojn ŝprucante ĝi akvumis,
por ĉiuj frato ĉiam, kiel infan' sen kulpo;
ĉe borde dum ĝi ravan melodieton zumis,
sin banis gekolomboj kaj trinkis laca vulpo.

Al ĉiuj ĝi donacis ofere serenecon,
amiko de l' bonuloj kaj de la malbonuloj,

maldanke oni en ĝin ĵetadis tero-pecon,
sed ja ne malpuriĝis la dancaj ondspeguloj.

Sed ve, nek temp', nek vivo ja senpostsigne pasas,
laciĝis kur' senbrida kaj ŝaumokanto rida,
la ebenejo sekvas, la montojn ĝi forlasas,
ju pli ĝi estas larĝa, jen des pli malrapida.

Ĝi estas larĝa, glata, majesta kaj profunda,
post la vojaĝo longa, kun lac' fiera zumas,
nenie sub la ondoj videblas ŝtono funda,
ĝin vintro ne katenas, somero ne konsumas.

Kaptita de la homoj ĝi estas nun utila,
ĝi movas muelilojn, uzinojn kaj fabrikojn,
ĝi pruntas sian dorson al pram' kaj ŝip' facila,
akvumas per kanaloj florkampojn kaj brasikojn.

Irado ĝia iĝas nun eĉ pli malrapida,
ĉar salo ja penetras amare en ondaro,
anoncas tiu salo pri l' maro viv-avida,
pri l' senmezura, nigra, terura, granda maro.

Pri l' mar', kiu ĝin glutos, sed ja el kies glutu
ĝi renaskiĝos iam per kiso de somero,
por esti ree nubo, vaporo, pluvoguto,
fonto, flueto, freŝa, torento kaj rivero.



DUM NOVEMBRA APRILO

Aŭtuno volas festi,
printempe sin transvesti,
burgonas nove flor',
eksaltas ree kor'
por nesti.

Kaj tamen venas vintro
(sed ĝi prokrastos sin tro).
Post pluvo dumonata
ĉiel' lazura, glata,
post cindro.

Ĉu estas pli alloga
vort' vera aŭ mensoga?
Ĉu portas pli da sveno
sanilo aŭ veneno
droga?

Ni revu: temp' someras,
mi kredas kaj esperas;
nigrega okulparo
min gapas en l' arbaro.
-Am' veras.

NOKTA BILDO

Sonas el la turo du hor' kaj duono.
Mi revas sendorma post mia balkono;
Sed dormas la eta provinca ĉefurb',
Velkintajn branĉetojn la vento frakasas.
Per paŝoj laŭritmaj policano pasas.
La luno vojiras tra ĉiela kurb'.
Drinkulo lamanta zigzagas la straton.
Vesperto skuigas la elektran draton
Malproksime ridas nokta belulin'.
Heroldo de morto –la popolo diras-
Noktua ekkrio silenton traŝiras.
-Ĉu pro birda amo? Ĉu pro homa fin'?

Daŭrigota